
# La Krokodil'



**n°63**
**jan. 2011**

**Informilo de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo**


**En tiu ĉi numero**
***Dans ce numéro***


Vidpunktoj de komencantoj......1
Spionetosa semajnfino.............2
Concert de Inicialoj DC.............2
Lernontoj, preparu vin!..............3
Kelkaj vortoj pri JES..................3
L'agenda du Kroko'...................4


"La Krokodil'" est le bulletin d'information du Centre Culturel Espéranto de Toulouse, association pour la promotion et l'enseignement de l'espéranto. Si vous souhaitez contribuer au "Krokodil'", merci de nous faire parvenir vos articles et photos.
Tous les articles du "Krokodil'" sont mis en ligne sur le blog, où il est également possible de laisser des commentaires.

**Visitez notre blog "La Krokodil'"**
*http://lakrokodil.wordpress.com/*




**ESPERANTO-KULTUR-CENTRO DE TULUZO**
*Centre Culturel Espéranto de Toulouse*
31, rue Franc 31000 Toulouse
Tél. : 05 61 62 39 48 - 06 31 68 00 26
E-mail : esperanto.toulouse@free.fr
Site : www.esperanto.toulouse.free.fr


## Vidpunktoj de komencantoj pri la Zam'Festo

Lastan dimanĉon la 12-an de decembro 2010 en Tuluzo okazis la Zam'festo. Ni venis okope el la urbo Paŭ. Inter ni, ses homoj partoprenis por la unua fojo al iu esperantista evento. Jen la raporto de niaj subjektivaj impresoj.

La plej multnombraj bone ĝuis la tagon:

**Eva M.** (25 jaraĝa) – *Mi ĝojas ĉar mi komprenis preskaŭ ĉion kaj mi lernis novajn vortojn. Mi pensis, ke pli da junuloj volus lerni la lingvon. Kvankam mi maltrafis la solan nefrancparolanton, tio tamen donis al mi la deziron komenci interŝanĝojn kun eksterlandanoj… Aliflanke, la tagmanĝo preparita de Marina estis bongusta.*

**Joano B.** (17 jaraĝa) – *Estis agrable renkonti aliajn esperantistojn kvankam estis malpli ol dum la somera FESTO. Tamen mi retrovis Sébastien kaj li helpis min por prepari mian venontan vojaĝon.*

**Patrick R.** – *Mi spertis, ke mi povis interŝanĝi kelkajn vortojn kun usondevena esperantisto kaj tio plaĉis al mi. Sed dum la teatraĵo, mi preskaŭ nenion komprenis.*

**Edwige C.** – *Mi trovis, ke la lingvo kantas agrable kiel muziko.*

**Henriko G.** – *Mi bone manĝis kaj ŝatis la kuiraĵon de Marina.*
*Ankaŭ al mi plaĉis la spektaklo de Gijom Nenufar (Guillaume Nénuphar).*

Tamen por du homoj, la finaj impresoj estas pli kritikaj:

**Daniel V.** – *Mi estis surprizita, ke la partoprenantoj ŝajnas malmodernaj.*

**Marion C. (17 jaraĝa)** – *Mi opinias, ke ĝenerale la tago estis iom tro monotona. Mankis energio kaj allogaĵoj por la junuloj.*

Finfine konkludante, Solange D.  deziras ke venontjare, ni estus tiel multnombraj el Paŭ, kaj dankas la Tuluzanoj kiuj memvole laboris por okazigi tiun feston.

***Solange kaj ŝiaj lernantoj el Pau***

# Spionetosa semajnfino en Arrout

Vidu, inter dudek homoj, niaj afablaj gvidantoj, Marion kaj Christophe, disdonis strangajn paperetojn al ĉiu, eĉ al la komencantoj kiuj ankoraŭ ne malkovris la lingvon. Ni devis sekrete legi misteran frazon konsistante el du partoj, kaj poste kaŝi la paperon, aŭ gluti ĝin…

Dum du tagoj, ni devis atente provi diri la unuan parton de nia frazo, kaj kiom plej atente aŭskulti ĉu iu diros la duan parton… Se jes, vi gajnis la unuan parton de la ludo, trovinte vian paron. Sed, vi povas plibonigi la aferon se vi sukcesas malkovri la aliajn parojn… Mi ne klarigos al vi la strangajn babiladojn, kiuj okazis inter la homoj…

La programo ebligis la partoprenantojn ĝui belegan promenadon ĝis apuda vilaĝeto, kie eblis admiri malnovan preĝejon, malnovan hidraŭlikan draŝmaŝinon, interparoli kun afablaj vilaĝanoj… kaj profiti la belan sunan veteron, laŭ la tiel nomita "indiana somero".

Kompreneble, kiel kutime, vespere ĉiuj ĝojis transloĝiĝi en tiu ĉi virtuala vilaĝeto, kie homlupoj kutimas mortigi vilaĝanojn, kie geamantoj protektas unu la alian, klarvidino decidas ĉu orienti aŭ ne la enketon. Kaj ĉiu akuzato ĵuras ke li senkulpas, krias, defendas sin, kaj fojfoje tiel bone mensogas ke li sukcesas trompi ĉiujn: fripono!

Sed, hororo, kiam, tuj post la dimanĉa matenmanĝo, oni malkovris kadavron en la ĝardeno…Kiu, kiam, kial, kiel? Kaj denove, sen forgesi nian sekretan frazon, duope, triope, la gajaj ĉeestantoj provis liveri alibiojn, pruvante ke ili estas sunkulpaj!

Vi ja komprenis, ĉu ne? Tia etoso nepre incitas la homojn paroli, kaj ridi! Des pli ke partoprenis Kataluno kaj Germanino, ju pli malmulte krokodilis la francoj. Fine de la renkontiĝo, ĉiuj enigmoj solviĝis, kaj la esperantistoj disiĝis afable, kun malpeza koro…

***Evelyne***

---

# Kelkaj vortoj pri JES

Junulara Esperanto-Semajno, kiu okazis apud Berlino, estis mia unua eksterlanda renkontiĝo, kaj mi tre ĝojis partopreni ĝin, kvankam mi tre lacis, dum kaj post la renkontiĝo!

Fakte, la vojaĝo estis tiel amuza kiel la renkontiĝo! Mi volis iri al JES per du noktotrajnoj: Tuluzo - Parizo kaj Parizo - Berlino por viziti la francan ĉerfurbon, mi malkovris la teruran metrosistemon, kaj iris al la plej gravaj lokoj... Vespere, mi renkontis amikon kun kiu mi devis voĵaĝi al JES ekde Parizo. Ni atendis nian trajnon, sed finfine ĝi estis nuligita... SNCF proponis al la vojaĝantoj dormi en seĝoj, en iu trajno atendante la morgaŭan trajnon... Sed feliĉe, iu afabla esperantisto kiu loĝis kvar metrostaciojn for de la stacidomo proponis ke ni dormu ĉe li, la vespero estis tiel bona ke ni preskaŭ ĝojis pri nia aĉa situacio!

Pri JES, precipe, ni festis, amuziĝis kaj enlitiĝis tre malfrue... Mi partoprenis ekskurson al Cottbus, belega kaj tre interesa urbo, ni havis gvidantinon germanlingvan kaj mia amiko Zeb tradukis esperante al ĉiuj! Post la gvidado, tiu gvidantino interesiĝis pri ni kaj demandis de kiu lando ni venas, kaj diris ke antaŭlonge, ekzistis esperantklubo en Cottubus.

La novjarvespero estis la plej bona de mia tuta vivo, multaj estis vestitaj bele kaj freneze kelkfoje! Fakte, mi festis ĝin dufoje, mi estis kun grupo de geukrainoj kaj mi festis kun ili la Ukrainan novjaron, unu horo antaŭe! "Snovim Godom" ili kriis: feliĉan novan jaron ruse! Iu amiko festis ĉiujn novjarojn de la mondo ĉiuhore, li feliĉis! Mi estis tro serioza, ne sufiĉe freneza por fari same, sed venontjare mi feliĉos kun li.

Nun, restas en mia menso neforgeseblaj memoraĵoj kaj mi certe partoprenos denove venontjare tiun mojosan renkontiĝon!

***Sebĉjo***

# Lernontoj, preparu vin!



Mi ne povis partopreni la unuan en aprilo, kaj mi tion bedaŭris. Ĉifoje, mi ne maltrafis la seminarion de ILEI, denove gvidita de Xosé Condé el Barcelono. Aliĝis 10 instruemuloj aŭ jam instruintoj, instruistoj. Triono estis tuluzanoj, triono venis de la regiono kaj triono de pli malproksime: Pariza regiono, Troyes, Dordogne… Eĉ unu argentino ĉeestis la seminarion kiel observanto, tute hazarde (tamen trafe) vizitante Tuluzon tiun semajnfinon.

La unuan tagon, post kelkaj bazaj informoj pri pedagogio kaj pri historio de instrumetodoj prezentitaj de Xosé, ni poste praktikis, kaj duope preparis kurseron.

Vespere, okazis manĝo-klaĉo en la sama loko kaj kelkaj esperantistoj de Tuluzo kuniĝis. Post la manĝo, Xosé diris por ni galegan (Xosé estas galego) kaj belegan ekzorcon ("ekzorco de la brulaĵo", sorĉo kontraŭ la malbonaj spiritoj kiuj abundas en Galegujo…) kaj samtempe preparis trinkindan kaj bonegan miksaĵon. La fajro stariĝis, la ĉambro ne brulis kaj la etoso varmiĝis…

*"…Putritaj truitaj kanoj, hejmo de vermoj kaj bestaĉoj, fajro de la vaganta animaro…"* iom timege sed ne tro.

Dimanĉe, ĉiu duopo rollude prezentis sian kurseron. Observi la aliajn en diversaj instrusituacioj, vidi plibonigindaĵojn, konscii pri kio mankis en nia preparado… Estis tre amuze, kaj tre lernige. Do, nu, mi kolektis multajn novajn ideojn, strebojn por la venontaj semajnfinoj en Arrout, kaj por la kursoj, kiujn mi okaze gvidos en Tuluzo.

Lernontoj, preparu vin!

***Marion***

---

# Concert de Inicialoj DC au Mandala



Le FAM (Forum des alternatives pour la musique) organisé par la FLIM (Fédération des Labels Indépendants de Midi-Pyrénées) c'est déroulé à Toulouse du 3 au 7 novembre 2010. Chaque label de la fédération a programmé un artiste. Vinilkosmo à présenté Inicialoj DC, un artiste de Francfort en Allemagne pour la sortie de son album « Urbano ». Le concert a eu lieu en cloture du FAM le dimanche 7 au Jazz club Le Mandala avec deux autres artistes (Thomas Bel d'Annexia et BD Harrington de Travelling Music).

Le concert d'Inicialoj DC a agréablement surpris le public par sa qualité et sa performance vidéo synchronisée avec la musique; une électro-pop à la fois coloré et mélancolique. Pendant 40 minutes Inicialoj DC à chanté des chansons en espéranto de son nouvel album ainsi que deux chansons inédites (une en anglais et une en français). Aussi trois de ces vidéos clip « La kontraŭsenco » (le contresens), « Tatua papili'» (papillon tatouant) et « Berlino sen vi » (Berlin sans toi) ont particulièrement marqué le set.

Un concert riche et efficace… on en redemande !

***Flo!***

# *L'Agenda du Kroko'*

***Retrouvez l'agenda mis à jour sur notre site : www.esperanto.toulouse.free.fr. Sauf indication contraire, pour toute demande de renseignement concernant l'agenda, merci de prendre contact avec Christine (Kiki) au 06.31.68.00.26 ou 05.61.62.39.48, ou bien en écrivant à esperanto.toulouse@free.fr***

---

## JANVIER - JANUARO 2011

**Mardi 24 janvier :** ***Conversation en espéranto***
Horaire : 19h30
Lieu : au café Le Cactus, 13, boulevard Lascrosses (à côté de la Poste de Compans-Cafarelli ).
Objectif : pratiquer la langue dans une bonne ambiance.
Prix: payer ses consommations
Organisateur : Asso Bilingue

## FEVRIER - FEBRUARO

**Vendredi 07 janvier :** ***Repas-Tchatche / Manĝo-klaĉo***
Les traditionnels Repas-Tchatche mensuels se poursuivent avec un nouveau rendez-vous chez un des membres de l'asso, Marc dans le quartier Casselardit. Chacun apporte un peu à boire et à manger et on partage en parlant en espéranto. Pour pratiquer dans la bonne humeur!
Lieu : Marc Roger, 69, bvd Wagner (Bat 5) (Metro Patte d'oie, bus 66)
Horaire: à partir de 20h00
Merci de prévenir Marion de votre venue : 06 87 64 75 84

**Mardi 15 février :** ***Conversation en espéranto***
Horaire : 19h30
Lieu : au café Le Cactus, 13, boulevard Lascrosses (à côté de la Poste de Compans-Cafarelli ).
Objectif : pratiquer la langue dans une bonne ambiance.
Prix: payer ses consommations
Organisateur : Asso Bilingue

**Jeudi 17 février:** ***Soirée spéciale jeux au bâton à palabres***
Horaire : à 19h00 !
Lieu : Le bâton à palabres, 15 rue de Thionville (quartier Colombette, Péri)
Objectif : pratiquer la langue en jouant
Tarif : 2 euros, une boisson sans alcool offerte
Contactez: Marion : 06 87 64 75 84

**Mardi 22 février :** ***Conversation en espéranto***
Horaire : 19h30
Lieu : au café Le Cactus, 13, boulevard Lascrosses (à côté de la Poste de Compans-Cafarelli ).
Objectif : pratiquer la langue dans une bonne ambiance.
Prix: payer ses consommations
Organisateur : Asso Bilingue

## MARS - MARTO

**Mardi 1er mars :** ***Panorama actuel de l'espéranto, présentation publique***
Horaire : de 19h00 à 20h30
Lieu : l'ENSEEIHT, près de Saint-Aubin
"Qu'est-ce que l'espéranto ? Qui l'a inventé ? Combien de personnes le parlent et dans quels pays ?
Pourquoi apprend-on l'espéranto et dans quels domaines est-il utilisé ? Y a-t-il des livres, de la musique, etc...en espéranto ? C'est à ces questions fréquemment posées sur la langue, et à d'autres encore, qu'est destinée cette présentation. Venez découvrir une langue singulière. "
Contactez: Marion : 06 87 64 75 84

**Dimanche 06 mars :** ***Concert du choeur Interkant***
Horaire : 18h00
Lieu : Eglise Saint-Sylve (Quartier de l'observatoire, metro Marengo SNCF)
Entrée libre

**Mardi 08 mars :** ***Début d'un cours express***
Horaire : 18h30
Lieu : à l'ENSEEIHT, 2, rue Charles Camichel
Objectif : s'initier à la langue et à sa culture.
Organisateur : EKC
Contactez: Christophe 06 31 80 40 07 / 05 61 62 39 48